


DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 4 (853) ✪ 2005

**Bildoj kaj impresoj de la
somera kongresa kunestado**



KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta
kun UEA**

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,

FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,

NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;

☎ +31 1724 20222;

✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12,

DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- ☛ Membro-subtenanto €30,- ☛ Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- ☛ pagante al Libro servo
€18,- ☛ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per
registrita letero al la kasisto de KELI. ☛ Se estas en
via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de
KELI ☛ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Heimdalsvägen 24,

S 149 32 Nynäshamn, Svedio;

☎ +46 (8) 52016816;

✉ dr_boarad@yahoo.se

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnicky@quick.cz

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

ENHAVO

Por libereco, Kristo nin liberigis	75
Pardoni kaj repaciĝi	78
Kio estas diservo	80
Neebla lando - ekkoni la pasintecan de Hungario, ...	81
Impresoj de la 17-a ekumena kongreso	82
Iom pri UEA kongreso en Litovio	86
Krome el Litovio	87
Mia speciala vespero de la renkontiĝo	88
Mi estas kiu estas - parto 4	90
Dio povas samtempe esti ĉie	91
Plejaĝa frato	92
Estrarano kaj kasisto	94
Kristanismo kaj arto	95
Sekai no tomo to - kun tutmonda amikaro manojn plektas ni	100

REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉifoje nia revuo enhavas multajn
kontribuojn de la Ekumena Kongreso
kaj la UK de UEA. Pro tio la numero
havas 28 paĝojn. Espereble la kon-
tribuoj povas doni iom da impresoj al
vi kiuj ne havis eblecon ĉe-esti kaj
samtempe servi al rememorigo al vi
kiuj povis surloke ĝui la etoson. Pluaj
kontribuoj sekvos sekvontnumere.
Mallongan pritrakton pri 'Diservo' mi
ricevis kaj mi esperas aliaj sekvos.
Kion vi pensas pri 'Diservo'? Kion ĝi
signifas por vi? Skribu mallonge al la
revuo. Skribu persone, teologie, pie,
teorie, subjektive, ŝerce, serioze aŭ
kiel ajn. Vi certe travivis multe rilate
al diservoj. En antaŭaj numeroj mi
havis problemojn kun malhelaj bildoj.
Mi esperas ni solvis la problemon kaj
nun vi pli klare povas vidi kion kaj
kiujn ili montras.

POR LIBERECO, KRISTO NIN LIBERIGIS

Prediko dum la ekumena kongreso en Piliscsaba 17/07/2005

Philippe COUSSON, FR

Karaj gefratoj en Kristo, tiu ĉi versiklo estis decidita kiel moto por la kongreso. Antaŭ ol trarigardi la tutan epistolon, ni rigardos ĉi tiun versiklon. Pri ĝi, mi ne disertacios, kvankam multaj jam disertaciis pri libereco.

Antaŭ ol direkti nin al la versiklo mem, kelkaj elementoj pri la epistolo. Paŭlo vizitis ĉi tiun regionon. Li lasis tie ekleziojn, atingitajn de la graco de la savo en Jesuo Kristo. Kaj jen, li ekaŭdas ke kredantoj de juda deveno, judismemuloj, pretendas postuli de la kredantoj de Galatujo la ordonojn de la tiuepoka judismo, dirante ke tiuj estas kondiĉoj por la savo. Tio kompreneble reagigis Paŭlon. Por Paŭlo, nenio plu estas adicienda al la verko de Kristo, al la amo kaj al la graco de Dio. Sekve, li atakas, argumentas, rakontas, klarigas, prezentas. Liajn renkontojn kun la disĉiploj pri la sama temo, la gracon de Dio, la savon per fido, la pravigon, faro de Dio, sed ne faro de la leĝo, la vivon de la kredanto reguligita ne per la leĝo sed per la Spirito.

Ni do rigardu ĉi tiun versiklon. En la originalo, ĝi komenciĝas per la vorto 'libereco'. gramatike je dativo, do kiel en Esperanto "por la libereco" aŭ "al la libereco". Notinde estas, ke ĉi tiu vorto respondas al la antaŭa vorto, la

Por libereco Kristo nin liberigis; tial staru fortike, kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco
Gal 5:1

lasta de la antaŭa ĉapitro, kiu diferencigas nur je unu litero, kaj kiu estas "la liberulino". Paŭlo kunligas sian tekston kaj sian argumentadon.

Do, kiun signifon doni al tiu libereco? Ĉu temas pri la moderna koncepto de aŭtonomio gvidata de la klerigita racio? Ĉu temas pri foresto de kontingenco, de hazardo, de ekstera postulo? Ĉu temas pri idealo por konkeri, por atingi, por kio oni devas lukti?

Fakte, la libereco, pri kiu temas en ĉi tiu versiklo, kiel cetero en la tuta Biblio, havas signifon nur kiam ĝi estas rezulto de liberigo. Ĝuste ĉi tie ĝi estas la rezulto de la liberigo farita de Kristo. Liberigi, tio estas, ĉi tie kaj en la tuta Biblio, forigi el sklaveco, forigi el malliberejo.

Oni povas trovi en ĉi tiu epistolo, kaj ankaŭ en la cetero de la Biblio, la aferojn, kiuj kapablas teni nin en sklaveco, en servuteco, en katenoj. Unue, la peko. Sed ankaŭ, kaj tio povas aspekti strange, la leĝo. Ne la leĝo, kiel morala kaj praktika kodo, kiel listo de farendaj kaj nefarendaj aferoj, sed la leĝo kiel rimedo por pravigo, kiel ilo

por alkalkuli cele al savo, cele al liberigo el la statuso de pekanto. Ĉi tiu leĝo tiam fariĝas sklaviĝo, kaj, ĉar estas neeble plenumi ĝin, ĝi fariĝas kiel drogo. Oni ne plu povas malhavi ĝin, kaj ĝi neniam satigas.

Tiuepoke, oni parolis pri la jugo de la juda leĝo, al kiu oni devis submetiĝi. Kaj tiu bildo ne estis negativa. Sed jam Jesuo renversis la vidpunkton, kiam li parolis pri sia jugo, kiu estas facila, malpeza, subkompreneble kontraŭe al tiu de la leĝo. Same ĉi tie kun Paŭlo, kiu parolas pri la jugo de sklaveco. Ne temas ĉi tie pri la jugo de la peko, sed de la jugo de la leĝo. Kaj tio estas la krio de la tuta epistolo.

Jen do kelkaj komentoj pri la kvin unuaj vortoj de la versiklo: Por libereco Kristo nin liberigis.

Por libereco: Tiu libereco, kiu estas nun nia, ĝi estis la celo de Kristo por ni, ĝi restas tiu celo kiam ni ne vivas ĝin. Estis, kaj restas certe ankoraŭ aferoj en niaj vivoj, kiu enkatenigas nin, kiuj sklavigas nin, kiuj poluas nin, kiuj putrigas nian vivon, kaj malfaciligas aŭ nebligas ĝin. Nu, ke ni estu liberaj rilate al ĉio ĉi tio, tio estas la celo de Kristo. Li volas nian liberecon. Pli bone. Li liberigis nin. Ne baldaŭ. Ne pli poste. Ne afero por atendi aŭ esperi. Farita. Efektivigita. Finita. Plenumita. Kristo nin liberigis. Nenio

plu por fari, nenio por aldoni.

Se ni estas liberigitaj, kaj tiaj ni estas, estas por la libereco. Bone. Sed kion tio signifas, efektive? Ĉu ne plu da reguloj? da devigoj? Fakte, oni devas inverse pritrakti la argumentadon. Ne temas pri aferoj kiuj malaperas, sed pri eblecoj kiuj malfermiĝas, okazoj por fari tion, kion ni devus jam esti farintaj, sed kiuj estis neeblaj por fari tiam. Tiu libereco estas la vivo laŭ la Spirito, estas la vivo de la fruktoj de la Spirito, la vivo de la amo por Dio kaj por la proksimumo. Ĉi tiujn aferojn malebligis aŭ malhelpis ĝuste la peko.

Ĉi tiu libereco, ĉi tiu liberigo, estas ankaŭ la fino de la kuro por pravigo, la fino de la postkura kulpeco - kompenso, estas la fino de la apotekista librotenado de niaj bonfaroj, de niaj meritplenaj agoj. El tio ankaŭ Kristo liberigas. La savo per graco, la senpaga donaco de Dio, kiel certeco ricevita, liberigas nin de la ebla angoro rilate al la amo de Dio.

Poste venas alia vorto, ordono, 'staru forte', aŭ 'persistu'.

Ne lasu vin delogi de tiu certeco pri liberigo, pri pravigo. Ne lasu vin trompi per iu postulo, per iu plenumenda sankteco, per iu provizenda pruvo. La savon, la liberecon, la novan vivon, donis al vi Dio, jam. Kristo akiris al vi ilin. Finite, farite. Tio estu via konvinko, via certeco, via espero, via ĝojo.

Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza.

Mat 11:28-30

Malgraŭ io ajn dirita al vi.

Via zorgo iru en alian lokon. Ne plu zorgu pri via savo, sed pri la vivo de atesto, de agnosko, fruktigante vian donacon, vivante de la fruktoj de la Spirito. Kaj tion faru ne kalkulante. Tiel funkcias la librotenado de Dio.

Kaj esprimo, pri kiu mi jam parolis, en la originala en formo de pasiva negativa imperativo: *“ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco”*.

Estas certe vere, ke por Judoj tiuepokaj aŭ niaepokaj, kompari la leĝon donitan post la liberigo el Egiptio al sklaveco aŭ servuteco, aspektas skandale. Sed, por Paŭlo, tio certe signifas, ke li pensis ke la praktikantaj Judoj perdis la veran signifon de la liberigo el Egiptio kaj de la leĝo. La popolo estis liberigita. Ankaŭ tiam, la liberigo estis farita. Kaj la leĝo estis ĉi tie simple por atesti pri tio, kion faris Dio, kaj kion li atendis el popolo liberigita. Sed, iompostiome, ili faris el tiu leĝo rimedon de liberigo, kondiĉon al la subteno de Dio. Sed, kiam Dio diris kaj rediris al ili sian interligon, Li diris al ili, ke ili profitas el tiu interligo. Sed, ĉar ili ne pensis tiun interligon akirita, ili serĉis daŭr-

igi ĝin per siaj klopodoj, aŭ eĉ ili serĉis apogojn ekster tiu interligo. Mallonge dirite, ili flankenlasis la interligon.

Jen, tio, kion Paŭlo ne volas por la kristanoj de Galatujo. Li volas, ke ili

restu konvinkitaj pri la amo de Dio, pri la liberigo kiun donis Kristo, per graco, pri la interligo en kiun ili eniris per fido, kaj pri la fruktoj de la Spirito, kiuj kreskos en iliaj vivoj.

Kie ni troviĝas, rilate al tiu liberigo? Ĉu ni ankoraŭ kalkulas, kio bone kaj malbone iras en nia vivo? Ĉu ni daŭre adicias la bonajn farojn, por kontraŭpezi niajn pekojn aŭ misojn? Vane, ni tion farus. Teni tiun kalkulon estas neebla, ĉar ĉiamaniere, la kalkulo ĉiam indikos deficiton.

Por libereco Kristo nin liberigis. Jen certeco kiu devas plenigi nin. Ni estas liberigitaj, kaj ni estas vokitaj al la libereco.

Liberigitaj el la peko, liberigitaj el la kulpeco antaŭ Dio, liberigitaj el niaj provoj kontraŭaĉeti, kompensi, liberigitaj el niaj angoroj, el niaj malesperoj antaŭ niaj malsukcesoj pri plibonigo.

Por la libereco, la libereco ami sen kalkuli, la libereco servi, la libereco atesti, la libereco glori Dion.

La fruktoj de la Spirito nenion alportas al tiu kiu portas ilin, sed ili pliriĉigas kaj nutras tiujn, kiuj ĉirkaŭas lin.

Kion do, ni diros, trovis Abraham, nia praavo laŭ la karno? Ĉar se Abraham praviĝis per faroj, li havis ion, pri kio fieri, sed ne antaŭ Dio. Ĉar kion diras la Skribo? Kaj Abraham kredis al Dio, kaj tio estis kalkulita al li kiel virto.

Rom 4:1-3

Por libereco, Kristo nin liberigis, tial staru fortike, kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco.

Amen.

Pardoni kaj repaciĝi

Jacques TUINDER, NL

En la biblioteko de mia loĝloko okazis antaŭ nelonge tre special-tema ekspozicio, kies lulilo staris en Britio. Ĝi estis dediĉita al la famaj vortoj de la Sud-afrika ĉefepiskopo Desmond Tutu: *“Pardoni ne simple estas nura altruismo; oni povas konsideri ĝin ankaŭ la plej bona formo de propra intereso”*. Per bildoj kaj rakontoj la vizitintoj povis eklerni kiel mondvaste homoj, surbaze de propraj spertoj, kontribuis responde al esencaj demandoj. Kiel solvi konfliktojn? Kiel ripari maljustajn interhomajn rilatojn? Kiel forigi ĉiajn formojn de perforto? Kiel supervivi la murdon je sia infano, siaj partner(in)o, patrino, patro, frato aŭ fratino? Kiel 'venki' terurajn perfortaĵojn, seriozajn fizikajn kaj psikajn mistraktadojn?

Jen tri personaj rakontoj pri homoj, kiuj – irintaj tra profunda valo – retrovis sin mem en tre forta maniero kaj faris paŝojn en la direkto de pardonado kaj repaciĝado.

1. Francis kaj Berthe-Climbië (Eburbordo)

Por povi garantii al nia sepjara filino Victoria bonan estontecon, ni konfidis ŝin al parenco en Anglio. Tie Victoria estis torturata kaj mortigata; kaj tion faris ĝuste tiu kiu estis promesinta ŝin helpi. Nin turmentis sentoj de kulpo,

senespero kaj malamo, sed ni ade preĝis, ke ni kapablu pardoni al la vera kulpulo. Mortis nia infano, sed se ni, gepatroj, iradus tra la vivo kun venĝemo, ni mortigus la enmensan kaj enkoran rememoron pri nia infano. Kia kontentigo kaŝiĝas en venĝemo? Nia plej granda deziro estas,

ke io pozitiva naskiĝu el ĉi tiu tragedio. Tial ni intencas malfermi en Eburbordo lernejon, kie al infanoj oni povas oferti

“Pardoni ne simple estas nura altruismo; oni povas konsideri ĝin ankaŭ la plej bona formo de propra intereso”

Desmond TUTU

bonan edukadon. Tiu lernejo simbolas nian manieron por teni vivantaj la spiriton kaj la nomon de nia filino.

2. Camilla Carr kaj Jon James (Anglio)

Camilla: En aprilo 1997 ni vojaĝis al Ĉeĉenio por starigi rekapabligan centron por milite traŭmatizitaj infanoj, sed tri monatojn poste nin ostaĝigis ribeluloj, kiuj dum 14 monatoj tenis nin en mallibereco. Oni terure turmentis nin kaj unu el la gardistoj ripetfoje min perfortis. Ĉar la ostaĝ-prenintoj pro la milito evidente estis traŭmatizitaj, ni decidis dum tiu periodo elekti la vojon de apenaŭa rezistado. La nura maniero

por elteni ĉi tiun teruran okazintaĵon estis: daŭre encerbigi al mi jenan tekston: “*vi neniam sukcesos tuŝi min ĝis en mian plej profundan kernon; mia korpo nur estas parto de tiu kiu mi estas.*” Kelkaj ĉeĉeniaj amikoj niaj neniel povas kompreni, kiel ni sukcesas pardoni ĉi ĉion al niaj ostaĝprenintoj. Mi rakontas al ili, ke mi kredas ke ĉiun pardonadon antaŭas komprenemo, sed ke oni komence devas ĝisfunde enlabori sin tra diversaj tavoloj por atingi tion. Unualoke oni devas lerni kiel interrilati kun propra kolereco; poste aperas la larmoj kaj se tiuj ekfluas, oni jam eniris la bonan vojon por trovi sian animan trankvilecon.

Jon: Ĉiun matenon ni praktikis jogokaj tajĉi-ekzercojn. Tiuj instruis al mi ke por venki la kontraŭulon oni devas kontraŭbatali hardecon per mildeco. Ni vivis je la dirmaniera karno de niaj dentoj. Oni min ĉiuflanke batis kaj ofte spirite turmentis. Kiam Camilla en la apuda ĉambro estis perfortata, dum mi mane kaj

“vi neniam sukcesos tuŝi min ĝis en mian plej profundan kernon; mia korpo nur estas parto de tiu kiu mi estas.”

Camilla

pura malico, sed kostis al mi multe da tempo rememori sen negativaj sentoj ĉion, kio okazis al mi.

3. Ghazi Briegeith kaj Rami Elhanan (Palestino & Izraelo)

Rami: Mi estis survoje, kiam mia edzino min telefonis dirante ke nia 14-jara filino Smador malaperis. Se io tia okazas, malvarma mano cirkaŭkaptas la koron. Oni kuras de amiko al amiko, de hospitalo al hospitalo, ĝis oni finfine alvenas ĉe kadavrejo kaj vidas bildojn, kiujn oni neniam forgesos dum la tuta cetera vivo. Ekde tiu momento oni estas alia homo. Ĉio komplete ŝanĝiĝis. Komence min konsumis kolereco kaj doloroj. Mi cerbumis pri repagaj rimedoj, sed mi demandis al mi: ĉu mi estus libera de miaj doloroj, se mi mortigus iun alian. Kompreneble ne! Por mia edzino kaj mi estis klare, ke kulpas la okupado. La sinmortiginto estis viktimo, same kiel mia filino. Mi ricevis inviton flanke de la Gepatra Cirklo, grupo de familioj, kiuj perdis siajn gekarulojn kaj strebas al repaciĝo kaj interna harmonio. Kun certa cinikeco mi vizitis la kunvenojn, sole nur por rigardi kaj konkludi. Mi vidis plenusojn da homoj, gepatroj, kiuj perdis infanojn en la milito kaj kiuj ankoraŭ sopiris pacon. Mi vidis araban virinon, vestitan en nigra longa robo. Sur sia brusto ŝi portis foton de sesjara infano. Kantisto kantis hebre- kaj arablingve, kaj subite mi sentis min kvazaŭ fulmotondre trafita. Mi ne povas ekspliki, sed post tiu momento mi ree havis kialon de mateno al mateno leviĝi. Ekde tiu travivaĵo mia laboro por Gepatra Cirklo fariĝis la koro de

mia ekzistado: sankta misio. Se Ghazi kaj mi sukcesas bone interkomunikiĝi kaj reciproke nin apogi, ambaŭ paginte la plej eble altan prezon, tiam tion kapablas ankaŭ aliaj!

Ghazi: Mian propran fraton oni murdis en 2000, la komenca jaro de la Intifado. Mi estis ĉe li ankoraŭ kelkajn minutojn antaŭ lia morto. Irante hejmen mi aŭdis pafon. Oni lin arestis kaj traserĉis ĉe kontrolo posteno. Kiam li protestis, kriis la militisto: “*Fermu vian klapon aŭ mi pafmortigos vin, filo de putino!*”. Al tio mia frato respondis: “*Vi mem estas filo de putino!*” tiam pafis la militisto. Estis mitralo en la manoj de infano. Komence mi perdis

la konscion, frenezigiĝis de ĉagreno. Tamen mi vidis la militiston, same kiel mian fraton, kiel viktimojn de la okupado. Sed pardonado estas afero persona. Eĉ se mi preferus pardoni la personon, kiu mortigis mian fraton, mi ne povus devigi la infanojn de mia frato al pardonado. Sed mi povas montri al ili, ke malfermi sian koron antaŭ repaciĝo kaj interna harmonio estas pli valora ol perforta respondo. Oni ne bezonas ami unu la alian por konstrui ponton inter ŝtatoj; necesas respekto. Se mi povas subteni mian Judan fraton Rami, respektante lin kiel li respektas min, tiam estas espero.

☞

KIO ESTAS DISERVO?

Matts LANDFORS, SE

Diservo estas Dia servo al ni, sed ankaŭ nia servo al Dio. Ni bezonas Dion, kaj Dio bezonas nin. Kiam Jesuo estis sur la tero li servis al la homoj por doni per tio gloron al Dio. Ĉiu bona servado estas Dia servado.

Kiam miaj svisaj amikoj dimanĉe iras al la preĝejo por diservo ili diras: Iri al la meso - se ili estas katolikoj - kaj iri al la prediko, se ili estas protestantoj. Por mi persone estas ofte tiel, ke bona dimanĉa diservo povas doni inspiron dum la tuta venonta semajno.

En kelkaj lingvoj, ĉefe latinidaj, oni uzas la nocion “*dia kulto*” = latine: “*cultus divinus*” por diservo. Diservo estas do ankaŭ religio kaj kulto - nia kontakto kun Dio.

Kion diras la Biblio pri la temo “*diservo*”? En la esperanta Biblio la vortkombino Di-servo ŝajnas manki. Sed la nocio mem estas trovebla. Jen kelkaj ekzemploj:

Eliro, 3:12: “*..., vi faros servon al Dio sur ĉi tiu monto.*”

Agroj 7:7 “*..., kaj poste ili eliros kaj faros servon al Mi sur ĉi tiu loko.*”

Jakobo 1:26-27 “*Se iu ŝajnas al si religia, ne bridante sian langon, sed trompante sian koron, ties religio (diservo) estas vanta. Religio pura kaj senmakula antaŭ nia Dio kaj Patro estas jena: viziti orfojn kaj vidvinojn en ilia mizero, kaj singardi sen malpuriĝo de la mondo.*” ☞

Neebla lando – ekkoni la pasintecon de Hungario, por kompreni la nuntempajn Hungarojn

Prelegis en Piliscsaba D-ro Endre DUDICH, HU

Dum sepdek minutoj estis prezentata la 1100-jara historio de Hungario laŭ speciala, nekutima, evidente subjektiva, en nenia senso “oficiala” vidpunkto: nome kiel sinsekvo de homaj krizoj kaj diaj helpoj.

Laŭ ĉiu rezonado pure homa, Hungario devintus esti jam delonge malaperinta; ĝia daŭra ekzisto ŝajnas neebla. “Ĝi tamen ekzistas, kaj bonvenigas vin kore, en la spirito de solidareco ne nur eŭropea, sed universala”.

Jen la plej gravaj katastrofoj minacintaj la ekziston de la lando kaj de la popolo.

- militiroj de la kristanaj feŭdalaj armeoj kontraŭ la paganaj hungaroj (dua duono de la 10^a jarcento);
- ribelo kaj civita milito post la morto de reĝo Stefano I^a (1038);
- invado de la Tataroj (1241);
- anarkio post la fino de la Arpada dinastio (1301);
- agreso de la Turka Imperio (batalo ĉe Mohács 1526); militoj dum unu jarcento kaj duono;
- germaniga regno de la Habsburga dinastio;
- subpremo de la milito por sendependeco fare de la rusa armeo (1849);
- nesolvitaj etnaj problemoj kaj konfliktoj;
- perdo de la 1^a mondmilito, disfalo de la Aŭstri-hungara Monarkio, paktkontrakto de Trianon (1920);
- perdo de la 2^a mondmilito 1945, sekvita de komunisma reĝimo;

- subpremo de la revolucio de oktobro 1956 fare de la soveta armeo.

La pozitivajoj malhelpintaj la definitivan pereon de la Hungaroj:

- krono petita kaj ricevita de la papo Silvestro II^a (1000);
- roma (ne bizanca) kristaniĝo;
- dediĉo de la lando kaj de la popolo al la Sankta Virgulino Maria fare de Stefano I^a;
- karismo de la gento de la Arpadoj (5 sanktulinoj kaj 3 sanktuloj);
- elstaraj personaĵoj ĝustatempe aperintaj kaj agintaj (ekz. la anĝevinaj reĝoj Karlo Roberto kaj Ludoviko I, militestro kaj gubernatoro János Hunyadi, reĝo Matiaso, kardinalo primaso Péter Pázmány (kies nomon portas la Katolika Universitato en Piliscsaba), grafo István Széchenyi “la plej granda Hungaro”, Ferenc Deák “la saĝulo de la patrujo” ktp.);
- la reformacio, subtenanta la nacian identecon (tradukoj de la Biblio, diservoj en la hungara lingvo ktp.);
- la deklaro fare de la Nacia Asembleo de Transilvanio en Torda pri la libera praktikado de la konfesioj katolika, kalvina, lutera kaj unitara (1568, la unuan fojon en Eŭropo);
- konservado kaj disvolvo de la propra lingvo kaj kulturo, ankaŭ helpe de la latina (oficiala lingvo ĝis 1844);
- intervenoj de la Sankta Virgulino Maria (ekz. 25 de marto 1990, liberaj elektoj; 8 de decembro 1991, fino de Sovetunio).

IMPRESOJ DE LA 17-A EKUMENA KONGRESO

La 58-a de IKUE kaj 55-a de KELI & la 7-a Junulara Ekumena Tendaro
16-23 juli 2005 en Piliscsaba, Hungario

Impresoj kaj notoj de Els VAN DIJK-KUPERUS, NL

Tiu ĉi raporto nomiĝas IMPRESOJ de la 17-a Ekumena Kongreso ĉar la programo estis tiom ampleksa kun tiom da prelegantoj ke mi ne povas detale informi vin pri ĉiuj unuopaj programeroj kaj pri la nomoj de ĉiuj kunlaborantaj personoj.

La elektita temo de la meditoj, preĝoj kaj interparoladoj estis: “*Por libereco, Kristo nin liberigis*” (Gal 5:1) – la epistolo al la Galatoj por hodiaŭ.

La kongresloko Piliscsaba situas 25 km nordokcidente de Budapeŝto en la direkto de Esztergom. Nia kongresejo estis la studenta hejmo (Josephinum) de la Romkatolika Universitato “Páz-mány Péter”.



Ĝi estis tre taŭga kongresejo ĉar la ĉambroj, la kongresalonoj kaj la kapelo troviĝis en unu domo. La arĥitekto de la universitato Imre MAKOVECZ, desegnis modernajn, okulfrapajn konstruaĵojn. Por atingi la manĝejon en la restoracio bezonis piedirantoj 10 minutojn. La promenado estis bona interrompo de la kongresprogramo por enspiri iom da freŝa aero. Survoje oni babilis kaj

admiris la belajn florojn. La kongresanoj kiuj ne povis promeni al la manĝejo estis transportitaj de kelkaj afablaj aŭtomobilposedantoj.

Ĉiujn tagojn okazis matenaj-, tagmezaj kaj vesperaj preĝoj. Albrecht



KRONENBERGER gvidis la matenan kantadon. La komuna kantokaj preĝlibro ADORU estis grava gvidlibro.

La gejunuloj devenis el Ĉeĥio kaj Hungario. Ili estis grandparte komencantoj. Ingeborg VAN DIJK (Nederlando) instruis kaj ludigis ilin helpe de Júlia ‘SIGMOND el Rumanio.

Sabato estis la tago de la alveno de la kongresanoj el 15 nacioj. Post la vespermanĝo komenciĝis la interkona vespero. La Loka Kongresa Komitato bonvenigis nin.

En tiu ĉi kunveno ni konatiĝis kun



pastoro Zoltán BÓNA de la Hungara Ekumena Konsilantaro kaj kun la

direktoro de la studenta hejmo Josephinum, s-ro Szilveszter BIRÓ.

Dimanĉe gvidis la romkatolikaj pastroj la Sanktan Meson kaj poste gvidis Éva FARKAS kaj Philippe COUSSON la Evangelian Diservon. Philippe predikis pri la kongresa temo kaj ni uzis la Reformitan Ordon de Diservo



el ADORU. La vespera programo estis tre gaja. Studenta popoldanc-grupo prezentis dancojn de hungaraj

farmistoj. Ili kantis, dancis, muzikis. Fine de la prezentado ili invitis la ĉeestantojn kundanci. Granda parto de la kongresanoj akceptis kun entuziasmo la inviton.



Lunde prelegis profesoro d-ro Endre DUDICH pri la historio de Hungario. La lando estis tra sia tuta historio la viktimo de diversnaciaj

okupadoj. Posttagmeze enkondukis nin Philippe COUSSON en la epistolon al la Galatoj kaj Jacques TUINDER informis pri sia batalo kontraŭ ne-necesa blindeco per la fondaĵo EVIDENTE. La vespera prelego kun lumbildoj pri Budapeŝto de Ágnes RÁCZKEVY



estis interesa kaj montriĝis ke ŝi estas sprita prelegantino.

Marde prelegis Siegfried KRÜGER pri: “Vojaĝo al Wittenberg”: LUTHER, MELANCHTON, CRANACH. En la kongresa sako (kudrita en Ru-

manio) kun la kongressimbolo desegnita de s-ino SOMHEGYI, inter alie troviĝis de Siegfried kompilita GVIDILO TRA LA BIBLIO. Post la kafopaŭzo ni ricevis informojn pri Esztergom de Zoltán SOMHEGYI. Tiu ĉi urbo estis la vojaĝcelo de la posttagmeza ekskurso. La urba teritorio estis



jam loĝata en la ŝtonepoko kaj en la 2-a jarcento post Kristo la romianoj konkeris la regionon. Poste invadis la Turkoj ekde 1543. La nunan grandan Bazilikon oni komencis konstrui en 1882. En la urbo estas la sidejo de la hungaria romkatolika ĉefepiskopo. Zoltan preparis nin por la vizito al la Kristana Muzeo de Esztergom per informoj pri kelkaj belegaj trezoroj. El ĉiuj salonoj de la Muzeo li montris la plej belajn aŭ interesajn

trezorojn. Fine de la posttagmeza ekskurso promenis unu grupo trans la ponto al Slovakio por naĝi en saniga banejo. Tiu ponto estis eksplodigita en la dua mondmilito kaj rekonstruita nur antaŭ du jaroj. La aliaj du aŭtobusoj



reiriis al la kongresejo.

Merkrede atendis nin la matenmanĝo jam je la 07.00-a horo.

La aŭtobusoj frumatene veturigis nin al Budapeŝto por la tuttaga ekskurso. La urbo estas jam du-miljaraĝa kaj situas sur ambaŭ flankoj de la Danubo. Meze de la dekstraborda monteca urboparto Buda,

regas la Fiŝkaptista Bastiono kaj la gotika Matias-preĝejo. Je la 09.00-a



horo ni eniris la preĝejon antaŭ la alveno de la amaso da turistoj. En la impona preĝejo ni povis partopreni sanktan meson en Esperanto sen aliaj



turistoj. La dua programero de la ekskurso estis la vizito al la novgotika Parlemeento je la maldekstra bordo de la Danubo en la urboparto Pest. La konstruado komenciĝis en la jaro 1885. La

eksterajn murojn ornamas 88 elstaraj figuroj de la hungara historio. En du grupoj ni povis eniri la imponan konstruaĵon gvidite de ĉiĉerono kies vortojn en mia grupo tradukis Ágnes RÁCZKEVY. Posttagmeze ni ĝuis kelkajn liberajn horojn kaj ni povis viziti vidindaĵojn en granda parko apud la



“Placo de la Herooj”. Post la vespermanĝo estis ebleco spekti filmon pri la 15-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Zagrebo.

Ĵaŭde matene okazis la jarkunvenoj de KELI kaj IKUE. Pri la KELI-jarkunveno mi informos per alia

raporto. Je la 16.30-a horo estis ebleco partopreni en reformita diservo kun sankta saĝo en la kapelo de la kongresejo. Ĉar ne partoprenis



pastoro de KELI en la kongreso, Éva FARKAS petis al la hungara luterana pastoro Béla THURNAY el Piliscsaba kun Philippe COUSSON celebri la sanktan



manĝon. Piliscsaba estis jam de longe grava por la luteranoj. Oni ekumene kunlaboras kun la lokaj romkatolikoj inter alie rilate la junularon.

Vespere ni ĝuis koncerton de la ĥoro el Etyek (apud Budapeŝto). La ĥoranoj prezentis diversnaciajn kaj diverslingvajn kantojn, grandparte popolkan- tojn sed ankaŭ kelkajn el la klasika muziko. La estrino, Ildikó MAGDÓ, estis ege bona direktistino kaj la tenoro János MÉSZÁROS havis bonegan voĉon. Kortuŝe solkantis juna lerne- jano vestita en popolkostumo.

Plurfoje la granda ĥoro disiĝis en virina- aŭ malgranda miksitaj ĥoro. La kantado estis altnivela. Ni povis ĝui tiun-ĉi eventon ĉar Ágnes estas hormembrino. La ĥoranoj decidis ke la



kutima monkokolek- to por la elspezoj nun estu por la agado “Evidente” de Jacques TU- INDER. Kolektiĝis euroj 305.

Vendrede matene informis Albrecht KRO-

NENBERGER pri la ekumena laboro en sia diocezo kaj prelegis Francisko SIMONNET. Fine de la posttagmezo gvidis Philippe COUSSON la resuman rondon. Ĝi estis ankaŭ la lasta kunsido

ĉar je vendredo kaj sabato matene multaj partoprenantoj jam forveturis.

Al la adiaŭa vespero kontribuis la junuloj per muziko kaj teatraĵoj. Ni aŭskultis de la plenkreskaj kongresanoj poemojn, kantadon, monologon, amuzan teatraĵon kaj okazis lotumado. Zoltán SOMHEGYI kaj Ingeborg VAN DIJK gvidis la vesperon. La prezidantoj de ambaŭ organizoj, Philippe COUSSON de KELI kaj Miroslav ŠVÁČEK de IKUE, dankis al la LKK-anoj kaj ili transdonis donacojn al: Éva FARKAS, Irén BAGI, Erzsébet KASZAB, Lajos KÓBOR. Menciitaj estis du helpantoj: Katalin BÁNÁTI, Johano BALCZER. Ni dankas ĉiujn kunlaborantojn kaj pre-



legantojn pro iliaj kontribuoj. Nur kun subteno de multaj personoj kongreso povas esti sukcesplena.

Sabato estis la tago de la adiaŭo. Tiuj kiuj forvojaĝis matene ricevis lunĉpakaĵon kaj aliaj restis por komuna tagmanĝo. Poste ankaŭ mi forvojaĝis. En la koro restas la memoro de kongreso en amika, kristana Esperanto- rondo

Els

Rim.: La redaktoro fotis. Substrekitaj nomoj en la teksto montras personojn en apudaj bildoj.

Iom pri UEA kongreso en Litovio

Fotoj kaj teksto de Erikas LAICONAS.

Ĉijare UEA kongreso okazis en la Litovia urbo Vilno. Jam sabatmatene la pastro Bernhard EICHKORN havis diservon en la katolika preĝejo de St. Rafaelo. Mi venis nur posttagmeze kun sacerdoto Lionginas Vaičiulionis. Dimanĉe okazis oficiala malfermo kiu daŭris du horojn kaj post

interrompo en la preĝejo de Sanktaj Johanoj okazis ekumena diservo gvidata de la pastroj B.EICHKORN el Germanio, G.BERVELING (predikis) el Nederlando kaj mi. La preĝejo estis plena. Vespere okazis katolika meso en la preĝejo de St.Rafaelo. Lunde matene en la Luterana preĝejo okazis luterana meso. Ĝin partoprenis ne multaj. La temo estis – „Ĉu ni vidas nian proksimulon“. Meze estas foto en la Luterana preĝejo de Vilno post la meso.

Katolikoj aranĝis diservojn trifoje dum tago, sed partoprenantoj ne estis multaj. Gravas, ke partoprenis. Tio montras, ke la semo estas semita kaj en estonteco ni povas atendi rezultojn.

Ĵaŭde matene okazis ekumena kunveno. Ĝin gvidis la pastro B.EICHKORN.

La partoprenantoj ne estis multaj, sed aktivaj. Estis prezentataj libroj: *Esperante kaj ekumene*; *Religia literaturo en esperanto* de Karl-Olof SANDGREN; *Adoru* (ĝenerala eldono kaj eldono kun pola aldono). Pli aktivaj uzantoj ricevis ilin donace.

Sube ni vidas malgrandan saloneton

plenan de aŭskultantoj. Homoj sidas eĉ sur la fenestroj kaj estis ankaŭ starantaj. Iomete estis rakontita ankaŭ pri la Ekumena kongreso en Hungario. Post la kunsido litovaj IKUE-anoj kolektiĝis aparte kaj preparolis kurantajn aferojn. Pro tio, ke mortis vicprezidanto de

la sekcio, estis elektita alia vicprezidanto de la IKUE sekcio Marius Dyglys. Li promesas aktive labori, eĉ se estos ebleco – komenci eldoni revueton de kristanoj en ĉebaltaj landoj. Dio donu al ili sukceson.

Ĵaŭde mi jam forveturis kaj sabate okazis fermo de la kongreso.

Sekvis postkongresaj aranĝoj. En Vilno restis labori blinduloj. Ili petis sian aranĝon komenci per la diservo.



La ekumena diservo okazis en la luterana preĝejo. Kiel vi vidas – ĝin partoprenis multaj blinduloj. Kompreneble kun iliaj gvidantoj. Himnojn ili lernis en la brajla skribmaniero. La



diservon gvidis la aŭtoro de la artikolo. La partoprenantoj estis el Aŭstrio, Danio,

Finnlando, Germanio, Hindio, Italio, Litovio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rusio, Svislando kaj Ukrainio. Entute el 13 landoj. Post la diservo sekvis ekskurseto, kiun gvidis Vytautas ŜILAS. En la foto malsupre ni vidas

ekskurson. Homo kun okulvitroj estas la ĉiĉerono V. ŜILAS, kiu rakontas pri la malnovtipaj konstruaĵoj. Tiam estis uzataj ĉevaltirataj ĉaroj kaj nun enveturi en la korton de la preĝejo oni ne rajtas per aŭtobusetoj, nur per leĝeraj aŭtoj. La blinduloj estas ege atentemaj aŭskultantoj.

Tiaj estas sciigoj pri la kristana movado dum la kongreso kaj postkongrese.

Impresojn pri la kongreso devus priskribi iu alia, kiu spektis deflanke kaj ne havis iujn aliajn taskojn. ☞



Krome el Litovio Kelkaj notoj faritaj de Wil VAN GANSWIJK, NL

Dum la 90-a UK en Vilnius okazis dimanĉon, la 24-an de julio ekumena diservo en la preĝejo Sanktaj Johanoj. Ĝi troviĝas en la malnova urbo je la korto de la universitato, ĉirkaŭ 30 minutoj de la kongresejo. Kvankam la preĝejo estis iom malfacile trovebla, tamen venis multaj Esperantistoj al ĝi. La kantlibroj *ADORU* estis disdonitaj por ke ĉiuj povu bone sekvi la liturgion. Gvidis la diservon la pastroj Eichkorn, Berveling kaj Laiconas. La legadon el la evangelio faris pastoro Berveling, kiu prizorgis ankaŭ la predikon pri kelkaj versikloj el Mateo 13.

Ĵaŭdon la 28-an okazis la IKUE/KELI kunveno de la 9-a ĝis la 10:30-a. La salono estis plenplena, estis pli ol 50 ĉeestantoj. Pastro Eichkorn, pastro Laiconas kaj M. Belosevic gvidis la kunvenon. La bluaj *ADORU* libroj, kiuj estis disdonitaj por uzi dum la kunveno, rajtis esti kunportitaj hejmen de tiuj kiuj ankoraŭ ne posedas ĝin kaj por kiuj la prezo estas bremsilo por aĉeti ĝin. Ni aŭdis raporton pri la EK en Hungario, pri la planoj de KELI kaj IKUE por la jaroj 2006 kaj 2007. A. Hanke raportis pri la 'Kirchentag' en Hanover, kie ŝi havis budon pri Esperanto. S-ro E. Lalenkov rakontis pri la rusaj ortodoksaj diservoj. La lingvo kiun oni uzas en ili estas fakte same kiel Esperanto artefarita lingvo. Pastro L. Nordenstorm el Svedio prezentis al ni 'Arne, la ĉefido' infanlibron, ĵus verkita de li. Post unu kaj duona horo interesiĝantoj por la sekva kunveno en la salono jam staris antaŭ la pordo, do nia kunveno devis ĉesi ĝustatempe. ☞

Mia speciala vespero de la renkontiĝo

Astrid HANKE, DE

Ĉiuj evangeliaj ekleziaj tagoj en Germanio komenciĝas per inaŭgura diservo kaj sekva vespero de la renkontiĝo. Tiel ankaŭ la 30-aj evangeliaj ekleziaj tagoj en Hanovro 2005. Ĉar mi laboris ĉe informstano de la Ekumena Esperanto-Ligo en la foiro de la eblecoj mi jam estis sufiĉe laca. Pro tio mi tuj post la inaŭgura diservo en la foirejo veturis al mia gastloĝejo en Hanovro. La trafikiloj inter la foirejo kaj la loĝejo estas la tramo (unu stacio) kaj poste aŭtobuso (veturdaŭro ĉirkaŭ 40 minutoj).

En la apudeco de la gastloĝejo mi renkontis mian gastiganton, kiu estis bicikle survoje al la centro de Hanovro por partopreni en la oficiala vespero de la renkontiĝo kaj tie trovi sian edzinon.

Post babilado mi plu iris al mia gastloĝejo, sopirante, meti miajn lacajn krurojn alten. Antaŭ la pordo mi serĉis mian ŝlosilon. – En la kutima loko de mia sako ĝi ne estas. Mi serĉis en la tuta sako. Neniu ŝlosilo. Ankaŭ ne en la nilona sako. Mi pripensu, kie ĝi estu. Por ke mi ne portu dum la tuta tago pezan sakon mi kunportis malgrandan sakon, en kiun mi metis nur la valoraĵojn kiel ŝlosiloj, monuoj, naztukoj, bombonoj kontraŭ tusado. Je la fino de la tago mi repakis ĉion el la malgranda sako en la grandan sakon kaj metis la saketon en la kofron kun la valoraj

eksponaĵoj kaj lasis la kofron ĉe la stando sub la tablo, kaŝita de kartonaj taburetoj. Ĉu mi vere remetis ĉion? Evidente ne!

Do, ne plendu, tuj reiru al la foirejo! Ek al la aŭtobuso (espereble mi ne maltrafus ĝin). En ia aŭtobuso survoje al la foirejo mia poŝtelefono sonoris. Mia unua penso estis, ke iu el miaj kunlaborantoj volis paroli kun mi. Sed ne. Estis mia najbarino el Westerland. Ŝi rakontis al mi, ke ŝi loĝigis kvarapan familion en mian domon. Ili ne ricevis sian per intereto antaŭmenditan loĝejon, ĉar la gastigantino forgesis, anonci al la peranto, ke ŝi intertempe jam forluis la koncernan loĝejon. Nun ili estis kvazaŭ senhejmaj (same kiel mi nun momente). Mi estis sufiĉe ŝokita. Ne pro

la fakto, ke mia najbarino loĝigis la familion en mian domon, sed pro tio, ke ĉiuj koncernaj litoj ne estis pretigitaj. Kiel

”
mia najbarino el Westerland. Ŝi rakontis al mi, ke ŝi loĝigis kvarapan familion en mian domon

mia najbarino rakontis, ĉi tiun problemon ŝi kaj la familio mem solvis. Ŝi nun volis scii de mi, kian luprezon ŝi postulu de ili. Nun mi diris al ŝi, ke ŝi postulu rabatitan prezon pro la ne ordigitaj ĉambro kaj litoj. (Mi ja ne havis ŝancon, ordigi la tuton ĉar miaj

nunaj gastigantoj en Hanovro estis ĝis nia foriro al Hanovro miaj gastoj en Westerland kaj ili kunportis min en sia aŭtomobilo al Hanovro)

Alveninta al la foirejo mi devis iri ek de la enirejo ĝis la halo 5 sufiĉan longan distancon. Intertempe la horloĝo montris la 22-an horon. Finfine mi staris antaŭ la halo 5. Ĉiuj pordoj estas fermŝlositaj. Mi alparolis skoltan helpanton kaj rakontis al li mian situacion. Li konsilis al mi turniĝi al la gardisto de la halo 4. Mi iris al la apuda halo 4 kaj serĉis la gardiston de la halo 4. Post kelka tempo li alvenis. Li estis tre afabla, sed li nur posedis la ŝlosilojn por la halo 4. Por halo 5 respondecas alia gardisto, kiu momente ne estas ĉi tie, sed per biciklo ie en la ĉirkaŭo. Sed la gardisto de la halo 4 alvokis la kolegon de la halo 5. Li baldaŭ alvenus. Intertempe kolektiĝis du aliaj personoj, kiuj petis eniron al la halo 5. Ili volis ankoraŭ meti ion al siaj informstadoj.

Finfine la gardisto de la halo 5 alvenis per biciklo (kaj kun la ŝlosilo). Mi denove rakontis al li mian situacion, kaj li lasis min eniri. Mi tuj iris al mia

stado, kiu situis tuj apud la enirejo, malfermis mian kofron prenis la saketon, trovis la ŝlosilon, remetis la kofron sub la tablon kaj kovris ĝin per la kartonaj taburetoj. Nun ĉio en bona ordo. Koran dankon al la afabla gardisto de la halo 5, kaj ek al la vojo hejmen.

Denove per tramo - unu stacio kaj poste longa atendado al la aŭtobuso en la direkto de mia loĝejo. Dum nokto kaj ankaŭ dum la ekleziaj tagoj ŝajne ĉiuj kutimaj horaroj de la publika trafiko estas senvalidaj. Mi devis atendi minimume duonan horon ĉe la aŭtobushaltejo kaj poste 40 minuta veturado per la aŭtobuso, poste 10 minutojn piedirado, finfine mi estis hejme duonan horon post meznokto.

Miaj gastigantoj revenis ĉirkaŭ je la sama horo hejmen. Venontan matenon mi rakontis al miaj gastigantoj pri miaj travivaĵoj hieraŭ kaj demandis ilin, kion ili travivis dum la vespero de la renkontiĝo. Ili diris, ke mia travivaĵo ne estas venkebla per iliaj travivaĵoj.



Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. Kaj aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio

Luk 14:13-15

MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 4

Mi estas la pordo de la Ŝafoj (Joh 10:1–10)

pastoro Bayo AFOLARANMI

Enkonduko

La larĝa teksto (Joh. 10:1–21) estas parabolo de ŝafar-paŝtisto kiun Jesuo Kristo donis por paroli al la homoj pri Tiu Kiu Li estas. En ĝi Jesuo Kristo deklaris du “MI ESTAS-dirajojn.” Unu de la dirajoj estos diskutata je ĉi tiu parto. La parabolo estas komprenata je la kompreno de koncepto de antikva Proksima Oriento de “paŝtisto.” Paŝtisto en la Malnova Testamento simbolas reĝan gardiston de la popolo de Dio. Ĉi tio estas la kialo pro kiu la grandaj viroj de la Malnova Testamento estis aluditaj kiel paŝtistoj (Jer. 23:1ss; Jeh. 34:1ss). Eĉ Dio estis nomata la paŝtisto de Izraelo en Psalmo 80:1 (vidu ankaŭ: Psa. 23; Jeh. 34:11–16).

La parabolo

(versikloj 1–5)

La priskribo estis montara paŝtista vidaĵo kiam la paŝtisto venis voki siajn proprajn ŝafojn el la enfermejo kaj elkonduki ilin al kie ili trovus bonan paŝtaĵon. La enfermejo estas malferma korto ĉirkaŭita de muroj kun nur unu eniro. Pordgardisto gardis ĝin nokte por bari ŝtelistojn kaj rabobestojn eniri ĝin. Iu ajn kiu grimpas la muron faros tion por nenia bona celo. Nur paŝtistoj havis la rajton eniri la enfermejon. Ili eniris ĉiumatene elvoki siajn ŝafojn. Ne estu

surprize ke la paŝtisto vokis siajn ŝafojn nome, kaj la ŝafoj rekonis lian voĉon kaj auskultis lin. La ŝafoj neniam sekvis fremdulon.

La reago de la homoj

(versikloj 6)

Kvankam la homoj, al kiuj Jesuo Kristo diris ĉi tiun parabolon, konis kaj eĉ komprenis sian lokan rilaton de paŝtisto al ŝafoj, ankoraŭ, je sia spirita blindeco, ili ne povis kompreni tion, kion Jesuo Kristo provis diri al ili. Estu notite ke ĉi tiu parabolo estis donita je la kunteksto de la spirita blindeco de la Judoj (vidu: Joh. 9:35–41). Multaj homoj aŭdas la vorton de Dio nuntempe, sed pro siaj spiritaj blindeco kaj surdeco, ili ne komprenas ĝin. Ĉu vi komprenas la vorton de Dio?

La unua deklaro

(versikloj 7–10)

Ĉar la homoj ne komprenis ĉi tiun parabolon, Jesuo Kristo aplikis ĝin en alia maniero. Li diris, “*Vere, vere, mi diras al vi: Mi estas la pordo de la ŝafoj*” (versiklo 7). Por kompreni ĉi tiun deklaron, ni reiru al la parabolo de paŝtisto-ŝafaro. Post kiam la paŝtisto apartigis siajn ŝafojn de aliaj ŝafoj, li kondukis ilin al la paŝtejo. Apud la

paŝtejo estas fermejo por la ŝafoj. La paŝtisto lokigis sin je la eniro de la fermejo kaj funkciis kiel pordo. La ŝafoj povas iri el la fermejo al la paŝtejo, aŭ se ili timus, reiri al la sekureco de la fermejo per la pordo. Jen, la deklaro de Jesuo Kristo: Li estas la “pordo” de la ŝafoj – la ununura pordo al provizo, savo kaj sekuro (vidu: versiklo 9). Ĉiuj aliaj kiuj venis antaŭ Li — la sinelektitaj estroj kaj la falsaj paŝtistoj — estas ŝtelistoj kaj rabistoj. Ili — kun sia estro, Satano — venis por ŝteli kaj buĉi kaj pereigi; sed Jesuo Kristo, la vera pordo venis, por doni abundan vivon. ☞



Akvarelo pentrita de Yu Jia De/IKON
 ikon@svenskakyrkan.se

Dio povas samtempe esti ĉie. Tion ni nomas la ĉie-esto¹ de Dio.

El la radia programo „Biblia Minuto” de s-ro Woodrow Kroll
 Elangligis Elmer ESCOTO

En la Psalmo 139:7, David demandas: *Kien mi iros for de Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo?* Mi ne scias pri vi, sed al mi estas granda konsolo scii, ke malgraŭ ĉio, Dio estas ĉi tie. Mi neniam estas sola. Mi neniam estas for de liaj gardantaj okuloj. Aliflanke, se mi vivas „duoblan vivon”, se mi ne vivas en la maniero kiun li volas, nu, Li ĉeestas ankaŭ tie. Li ĉeestas en niaj plej privataj momentoj.

Depende de tio kiamaniere vi vivas, la ĉie-esto de Dio povas esti bona aŭ malbona novaĵo. Ĉu vi volas scii pli? Malfermu vian Biblion. Per ĝi vi lernos pri Dio, kiu estas ĉie. Malkovru la vojon al sukcesa vivo antaŭ la okuloj de Dio. Se vi faros tion, vi restos en la scio, ke nia Granda Dio estas tie por vi!!

¹ Mi ne certas, ĉu la Esperanta vorto kiun mi uzis, taŭgas. La vorto celas esprimi la econ de Dio, per kiu Li samtempe estas en ĉiuj lokoj.

Dio benu vin ĉiujn!

Rim: Alia propono estas ke oni uzu la vorton ‘ĉie-ĉeesto’, kiu pli bone esprimas la nocion. /red

Plejaĝa frato

MU Bingua, Ĉinio

Dum pluraj jaroj mi ne vidis mian plejaĝan fraton. Ĉi-foje okazis, ke mia patro grave malsaniĝis kaj tial mi revenis mian naskiĝhejmon. Jen mi havis la ŝancon ree renkonti la plejaĝan fraton.

La plejaĝa frato ankoraŭ tenas sian originan figuron alta kaj malgrasa, tamen ĉi-foje mi ekhavis la novan trovon, ke li estas rigora ĉebuŝe sed indulga ankore.

La plejaĝa frato detale zorgis la patron malsanan, ne forlasante tage kaj nokte. Li montris sin pli kaj pli malgrasa kiel skeleto. Kiam mi vidis la malfortan patron kaj la lacegan plejaĝan fraton, mi nur povis laŭte plori. Ankaŭ kelkaj pliaĝaj fratinoj kune kun mi ploradis. La patra ĉambro tuj pleniĝis de malĝojo; stagnis atmosfero dense tristiga. Rimarkinte tion, la plejaĝa frato igis min kaj la pliaĝajn

fratinojn elĉambriĝi, kaj ekster la ĉambro kun voĉo kaj mieno rigoraj nin kritikis; “Ne ploru! Kiel la rezulto de plorado, venos pli grava malsano al la patro. Estas nebone, ke ĉiuj vi larmadas. Mia frato, ankaŭ vi plenkreskiĝis, kaj ni nun revenigis vin hejmen, ne por ke vi ploru antaŭ la patro!”

Dum ni regis nin neplorantaj, la plejaĝa frato fulme rapidis en la orientan ĉambbron. Kiam li de tie eliris, mi ja klare rimarkis liajn okulojn ruĝaj. Superflue diri, ke li pene sin tenis, efektive li ploris ne antaŭ ni!

Baldaŭ la patro forpasis. Post kiam la familio finis la funebran ceremonion de la patro la plejaĝa frato kaj la fratinoj komencis konsiliĝi pri mi. La fratinoj ĉiuj montris, ke ili tutforte helpos min ekonomie; la unua pliaĝa fratino deziris plibonigi mian loĝkondiĉon, la dua pliaĝa fratino promesis liveri al mi vestojn kaj aliajn objektojn.

Nur la plejaĝa frato diris nenion. La fratinoj senkomprene rigardis lin. Finfine li parolis al mi indifere: “Vi estas jam en plenaĝuleco, devas havi vian propran opinion kontraŭ via vivo kaj per via propra forto fondi vian familion. Ne ĉiam esperu, ke iu helpos vin. Sed se konfesi veron al vi, frato, mi ne intencas iel helpi vin. Iru vian estontan vivojn ĉefe per vi mem.”



La redaktoro petis ĉi tiun biografion kaj eble ĝi estas leginda por vi. Memorante la pasintecon por mi mem estas interesa kaj necesa. Kiel rapide forflugis la tempo! Ankoraŭ en ĉi tiu jaro mi 70-jariĝos. Naskita kaj studinta en Berlino, mi 1957 transloĝiĝis al Stuttgart kaj komencis la deĵoron kiel fervojista inĝeniero. En 1997 mi emeritiĝis kaj tiu jaro estas la komenco de mia KELI-kasisteco.

Kiel komenciĝis la esperantistiĝo? Mia patro, viktimo de la dua mondmilito, estis ekspedista komercisto. En lia libroŝranko mi trovis kiel junulo la trivoluman, instruan libron *“La komercisto de hodiaŭ”* (1926), en kiu estis tuta ĉapitro pri Esperanto. Je tiu tempo oni rekomendis al mondvaste

aganta komercisto lerni Esperanton.

Fascinis min la ideo, sed ĝi estis nur semo, kiu pli poste ekkreskis. En 1967 en la fervojista direkcio en Stuttgart esperantistoj ekspoziciis pere de Esperanto kolektitajn pupojn el la tuta mondo. Samtempe oni informis pri la lingvo kaj kolektis subskribojn por peticio al UNESCO.



Sekvis kurso kaj poste mi respondecis pri la fervojistaj esperantistoj en la distrikto. Mi komencis korespondi internacie kaj ankaŭ kongresi. Nun mi kalkulis 21 KELI-kongresojn (inter ili ankaŭ la ekumenajn) kaj 11 fervojistajn kongresojn de IFEF. La fervojistoj sloganas *“La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn”*. Por mi necesas aldoni *“kaj dividas la familion”*, ĉar mia edzino toleras mian amon al Esperanto sed ne esperantistiĝis. Mi do devis limigi mian kongresemon.

Ĉar KELI multe kontribuis al mia spirita kreskado, mi nun pli ofte kongresis kun KELI ol kun IFEF, kvankam ankaŭ la fervojistaj kongresoj estas vizitindaj. Impresis min la kantemo de la KELI-kongresoj kun Adolf Burkhardt kaj multaj amikecoj pliriĉigis mian vivon.

Kun la kasisteco venis apud la plezuro la devo. Mia kara antaŭulo Leen HORDIJK estis profesia librotenisto kaj mi nur senkomputila laiko. Leen multe helpis al mi kaj post du vizitoj en lia hejmo mi kuraĝis memstare agi. Do necesis aĉeti komputilon kaj ankaŭ tiurilate lerni. Ankaŭ faksilo necesiĝis por la pli rapida kontakto kun la eldonisto en Pollando, poste sekvis la komunikado per la Interreto. La enkonduko de la Euro estis provoko en la kasista laboro, sed fine mi ankaŭ tion venkis.

Volonte mi transdonus la kasistecon al pli juna KELI-ano; estas unika ŝanco kreski multflanke kaj ne estas nur laboro. Vivu KELI kaj Esperanto!

Kristanismo kaj arto

Laŭ la kolekto de la Kristana Muzeo de Esztergom, Hungario

Bazita sur prelego en Piliscsaba, Zoltán SOMHEGYI, HU

Por longa tempo arto estis la servisto de kristanismo. Ekde la komenco de la mezepoko, kiam la disputoj pri la ebleco de la reprezentado de Dio finiĝis, la eklezio fariĝis la plej grava „mendisto” de artaĵoj. La temoj de la bildoj kaj skulptaĵoj venis el la Biblio aŭ el libroj pri la vivo de diversaj sanktuloj.

La Kristana Muzeo en Esztergom havas ege interesan kolekton el kristanaj artaĵoj. Nun mi invitas Vin al „virtuala” promenado tra la salonoj de la Muzeo, por iom interkonatiĝi kun la valoraj pentraĵoj kiuj estis kolektitaj dum la pli ol 130 jara historio de tiu ĉi instituto.

Pri la origino de la Muzeo: la unua ideo de la fondado estis de Arnold Ipolyi (1823-1886). Li estis episkopo de Nagyvárad (hodiaŭ Oradea, en Rumanio), etnografo kaj la unua art-historiisto. Li revadis ke ĉiuj diocezoj havu Muzeon kun kristanaj artaĵoj. Li ne povis efektiviĝi tiun planon, sed lia projekto ege plaĉis al János Simor (1813-1891), kiu estis la ĉefepiskopo de Esztergom. Do, la Muzeo malfermiĝis en 1875. Unue, la kolektaĵo troviĝis en la granda salono de la biblioteko de la ĉefepiskopa preĝejo. La unua katalogo de la Muzeo aperis en 1878. La kolektado daŭris plu, kaj en la komenco de la 20-a jarcento jam la scienca arthistoria faklaboro kaj esplorado komenciĝis. Dank’ al Dio, dum la dua mondmilito ne okazis gravaj

difektoj inter la trezoroj, kaj dum la socialismo la Muzeo povis gardi sian aŭtonomion, kiel „privata” Muzeo. Ekde la 1950-aj jaroj estas organizitaj ĉi tie diversaj ekspozicioj.

Ni komencu kun la malfru-mezepokaj aloaj altaroj. La nomo venas de la formo. Tiuj altaroj havas unu mezan bildon, kaj du aŭ kvar „alajn” aŭ flankojn. Kun tiuj aloj oni povis fermi aŭ malfermi la altaron. Plej ofte dum Pasko estis la altaroj fermitaj. Pro tiu ĉi kialo oni kelkfoje trovas la reprezentadon de la Pasiono en la ekstera flanko de la altaro, ĉar kiam dum Pasko por kelkaj tagoj la altaro estis fermita, la komunumo vidis scenojn el la Pasiono.

La aloaj altaroj de la 15-16a jarcentoj estas tre gravaj por la fakesploristoj kaj ankaŭ por la publiko, ĉar el tiu periodo ege malmultaj restis, ĉar poste venis la turka okupado, kaj multaj kristanaj trezoroj malaperis.



Bildo 1: Kolozsvari

Unue mi ŝatus skribi kelkajn vortojn pri la pentraĵoj de Tamás Koložsvári. Lia altaro (1427); (bildo 1 sur la antaŭa paĝo) venis el Garamszentbenedek, hodiaŭ: Benadik, en Slovakio. Tio estas unu el la plej fruaj, konataj hungaraj altaroj. Sur tio oni vidas la historion de la Pasiono de Kristo kaj scenojn el la vivo de tri sanktuloj: Benedikto, Egidio kaj Nikolao. Kompreneble la stilo ankoraŭ estas iom „ĉarma” aŭ naiva, sed tio ne estas nur kulpo de la artisto, sed ankaŭ karakteriza de la stilo. Tiu stilo nomiĝas internacia gotiko. La nomo venas el la tendenco, ke ĉirkaŭ en 1400 en preskaŭ ĉiuj landoj de la Kristana Eŭropo oni vidas similan stilon: molan pitoreskecon, dekorativajn ritmojn kaj liniojn, lirikan atmosferon, delikatajn formojn kaj fabelan etoson. Ekz. sur la dua bildo ni vidas la morton de Sankta Egidio. Laŭ la




Bildo 2: Egidio

la sago trafis Egidion. Sur la bildo ni povas vidi la dekorativan stilon: la sceno ne havas propran perspektivon, sed estas plata kiel tapiŝo. La proporcioj ne estas harmoniigitaj: la sanktulo estas preskaŭ tiel granda kiel la domo, sed la ĉasisto

estas multe pli malgranda. La kialo estas ke la pentristo volis emfazi la gravecon de la sanktulo.

La sekvonta artaĵo kiun mi ŝatus montri al Vi venas el la sama loko, Garamszentbenedek. Tio estas Ĉerko de Kristo de la jaro ĉirkaŭ 1480. Tio estis parto de la ceremonio dum Pasko. La statuo de Kristo – kies originalo estas eĉ hodiaŭ en la preĝejo de Garamszentbenedek – havis moveblajn brakojn, do, dum Sankta Vendredo oni metis la korpon en la Ĉerkon, kaj Sabate elprenis ĝin, kaj en procesio kun la malplena ĉerko oni montris ke



Bildo 3: ĉerko

Li resurektis. Tiamaniere sur la flankoj ni vidas scenojn el la Biblio: la dormantaj soldatoj ĉe la tombo, la virinoj ĉe la tombo kaj Kristo ĉe la Limbo de la infero. En la supra parto estas la apostoloj.

Ege gravaj trezoroj de la Muzeo estas la pentraĵoj de la Majstro M. S. (ĉirkaŭ 1506). Ni ne konas lian veran nomon, nur la monogramon, kiun li metis sur la pentritan tombon de la resurektinta Kristo. Tiuj kvar bildoj originale estis en Selmečbánya (hodiaŭ Banská Stiavnica en Slovakio), kie en la preĝejo sur la altaro ili formis rondon pri la vivo de Kristo. Aliaj pentraĵoj el tiu serio ankoraŭ estas konataj, ekz. la Vizitado



Bildo 4: MS

de Maria ĉe Elizabeta estas en la Nacia Galerio en Budapeŝto. La kvar bildoj kiujn ni trovas en la Kristana Muzeo estas scenoj el la Pasiono de Kristo, do el la ekstera flanko de la aloa altaro. Oni facile povas vidi, ke la arto de la Majstro M.S. estas jam

malsama stilo ol tiu de Tamás Kolozsvári. Ne nur ĉar estas 80 jaroj inter ili, sed ankaŭ ĉar M. S. jam estis pli proksime al la renesanco. Tiamaniere la proporcioj de la figuroj estas pli bonaj ankaŭ en si mem kaj inter si, en la horizonto ni ofte vidas interesajn urbojn, kies arkitekturo estas simila al la itala renesanca arkitekturo, kaj la naturo estas pli „natura”, kelkfoje tute laŭnatura. Tio ne estas miriga, ĉar la pentristo povis jam uzi grafikajn antaŭbildojn, do, tre verŝajne li konis la verkojn de Andrea Mantegna, Martin Schongauer kaj Albrecht Dürer.

Por esti pli internacia, nun mi montrus du bildojn kiuj venas el nunaj Benelux ŝtatoj. Unue malgranda bildo de la tre konata majstro de Brugge, Hans Memling (1433-1499). Li pentris ĝin en la lasta jardeko de sia vivo, do, verŝajne cirkaŭ 1490. Sur la bildo ni vidas la „Vir Dolorum”, la Viron de Doloroj. Laŭ fakesploristoj la bildo estis en paro kun Maria, kaj la du formis

malgrandan altaron. La bildo estas ege malgranda: 13 cm oble 10 cm, sed tio ne ĝenis Hans Memling por pentri la korpon de Kristo kun ege delikataj linioj kaj laŭvivaj, plastikaj formoj.



Bildo 5: Memling

La Kristo de Hans Memling estas ankoraŭ pli proksime al la mezepoka tradicio de la statikaj, ikon-similaj sanktuloj, sed la bildo de Jan Wellens da Cock pri la tentado de la eremito Sankta Antonio; (ĉirkaŭ 1520) estas pli vigla. Jan Wellens da Cock estas sekvanto de la fama Hieronimus Bosch, tial sur tiu bildo ni vidas ekz. en la suba maldekstra angulo la mistikajn-fabelajn figurojn tiel karakterizaj ĉe Bosch. Sed ni ne devas longe pensadi pri iliaj „funkcioj” aŭ signifo: ili reprezentas la sep gravajn kulpojn: Voluptemo, Envio, Pigreco por



Bildo 6: Cock

la bono, Voremo, Avareco, Kolero Orgojlo.

Ege interesaj estas la ortodoksaj ikonoj en al Muzeo (bildo sur sekvonta paĝo). Tiu ikono kiun mi montras ĉi tie estas el la 16-a jarcento, kvankam ĝi



Bildo 7: ikono

shajnas esti multe pli malnova. La kialo estas, ke la stilo de la ortodoksa ikon-pentraĵo ne ŝanĝiĝis tiel rapide kiel la stiloj en Okcident-Eŭropo. En la ortodoksa kulturo la bildoj, ikonoj havas sanktan honoron. Ili ne nur estas bildoj, sed vere, laŭvorte „re-prezentadoj” de Dio. Tial, ili estas super la ŝanĝoj de homaro, de tempo kaj de stilo. Ili ne havas tempon, kiel Dio ne havas aĝon.

Post la ikonoj, reirante al la Okcident-Eŭropa arto, ni daŭrigus kun la barokaj bildoj de la 18-a jarcento. La movriĉaj, tordiĝantaj figuroj kaj la fortaj koloroj estis karakterizaj en tiu ĉi periodo kiel ankau la kontrasto de la lumo kaj mallumo. Belan ekzemplon ni vidas sur la bildo de la laŭnome ne konata germana aŭ aŭstria pentristo, el la mezo de la 18-a jarcento. La temo estas la adoro de la reĝoj. La infanetoj,

anĝeloj en la ĉielo ĵetas florojn al la malgranda Jesuo, la lumo de la stelo ankaŭ etendiĝas al Li. La tuta bildo estas tre bone legebla, tre „retorika”, ĉar unu el la plej gravaj intencoj de la tuta baroka periodo kaj stilo estis konvinki la homojn. Laŭ kelkaj esploristoj la baroko estis nur kontraŭ-reformacia propagando. Eble tiu opinio estas tro akra, sed certe tiu pentraĵo estas tre bela, kortuŝa, sole-na kaj bone legebla.



Bildo 8: adoro

La lasta bildo kiun mi montras al Vi estas el mia plej ŝatata periodo: la itala 18-a jarcento: la pentraĵo de Giovanni Paolo Pannini, de ĉirkaŭ 1710. La temo ne estas evidenta, eble la prediko de iu apostolo, sed apud la temo reprezentata de la figuroj estas grava ankaŭ la alegorio reprezentata pere de la ruinoj. La antikvaj arkitekturaj formoj ne estas korektitaj, Pannini pentris ilin tiel, kiel li vidis ilin en la 18-a jarcento. Tiamaniere ili farigis alegorio de la pasinteco kaj de la ne reportebla antikva harmonio. Tiu tendenco jam montras la sekvontan, ĉi tie ne diskutatan periodon de arthistorio: la klasikismon. ☞



Bildo 9: Pannini

estas el mia plej ŝatata periodo: la itala 18-a jarcento: la pentraĵo de Giovanni Paolo Pannini, de ĉirkaŭ 1710. La temo ne estas evidenta, eble la prediko de iu apostolo, sed apud la temo reprezentata de la figuroj estas grava ankaŭ la alegorio reprezentata pere de la ruinoj. La antikvaj arkitekturaj formoj ne estas korektitaj, Pannini pentris ilin tiel, kiel li vidis ilin en la 18-a jarcento. Tiamaniere ili farigis alegorio de la pasinteco kaj de la ne reportebla antikva harmonio. Tiu tendenco jam montras la sekvontan, ĉi tie ne diskutatan periodon de arthistorio: la klasikismon. ☞

Informoj

Hieraŭ [fino de junio] mi anoncis al la planantoj pri la ELNA-Kongreso 2006 (verŝajne okazonta en Sandiego [Kalifornio] en junio) mian intencon prelegi tie pri "La Biblia Lingvaĵo kaj Biblia Tradukado" aŭ simila temo. Mi invitas Dia Regno-legantojn, kiuj havas ideojn pri tiu temo, konsili min pri tio, kion mi diru. Mi intencas koncentriĝi pri sed ne strikte limi min al la kampo de la Biblio *en Esperanto*.

ROS' Haruo / 2355 Eastlake Ave E / Seattle WA 98102 / Usono
lilandbr@scn.org aŭ lilandbr@hotmail.com / tel 206-324-3176
ROS' Haruo = Leland Bryant ROSS

Kara Els,

pasintan semajnfino [11-12/6]
Madzy kaj mi ĉeestis parton de la ekumenaj eklezio-tagoj (Kirchentage) en Aalen (Germanio). Sabaton posttagmeze okazis tie ekumena diservo gvidata de pastro Kronenberger kaj mi; ĉeestis sufiĉe bona grupo da esperantistoj – kaj vespere mi prelegis en la urba biblioteko – Germanlingve! – pri la Remonstrantoj: historio kaj serĉado al toleremo. "auf der Suche nach Toleranz". Eble interese por vi.

kore
Gerrit BERVELING



Ivanka Stoyanova, nova KELI-peranto por Bulgario.

P.O. Box 701
BG-9000 Varna
Bulgario

Kiel 14-jara junulino mi esperantiĝis. Mi loĝas en Varna, Bulgario, kun familio. Profesie mi laboras kiel fervojistino. Esperante mi aktiviĝas kiel:

- ✓ DM de UEA;
- ✓ delegito de Varna;
- ✓ FD-fervojoj, turismo, korespondado;
- ✓ peranto de SAT por Bulgario;
- ✓ peranto kaj distribuanto de LF-koop (Svislando);
- ✓ korespondanto de Mondcivitana Registrolibro

Sekai no tomo to –

Kun tutmonda amikaro manojn plektas ni

Ĉe la ELNA-Kongreso komence de junio, okaze de la kristana Diservo, ni kantis mian Esperantigon (parte traduko, parte subinflua novverko) de "Sekai no tomo to" de YAMAGUTIT Tokuo. Bedaŭrinde, ĉiuj kunkantantoj estis nordamerikaj anglalingvanoj. Eble iu en Eŭropo povos reuzi ĝin en pli internacia aranĝo. Jen la teksto:

*Kun tutmonda amikaro manojn plektas ni,
Sur la kruca bazo staras en frat-harmoni'.
Dian Regnon alstrebante, preĝas ni kun ĝoj':
Krist', Savanto, gvidu nin: estu nia Voj'!*

*Multaj lingvoj, multaj landoj, tamen unu kor':
Unuecon trovas ni ĉe l' amo de l' Sinjor'.
En malesperigan mondon venas la Esper':
Kristo, Mastr', enloĝu nin: estu nia Ver'!*

*Montru al ni la sekretojn sub la mondsurfac'—
Kie por skuitaj koroj estas vera pac'?'
Al la afliktata hom' mortanta pro soif',
Krist', Paŝanto, nutru nun: estu nia Viv'!*

*Voyo, Vero, Vivo Vi ja estas, Krist' Jesu',
Pano, Pordo, Pek-portanto, Di' kaj multe plu.
Dum ni marŝas tra la valo de la ter-pilgrim',
Krist', Sinjor', apudu nin ĝis la vojofin'.*

La melodio (TOKYO) de KOIZUMI Isao, laŭ la japana ĉant-modo “gagaku”, estas havebla per MIDI-dosiero ĉe

<http://www.geocities.com/cigneto/thcmid/t/>

(klaku tie al Tokyo1.mid por simpla unustrofa aranĝo aŭ al Tokyo_gagaku_4.mid por pli plena kvar-strofa). La japana originalo estas verkita en 1958 okaze de internacia kongreso pri kristana edukado en Tokio.

ROS' Haruo

世界の友と